NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/OKTOBRO 2008 **Nro. 75 (3/08)**



Vaskaj esperantistoj partoprenantaj la Universalan Kongreson de Roterdamo. (De maldekstre dekstren: Jesús M. García, Xabier Rico, Iciar Arteche, José Luis Bringas, Teodoro Ibáñez kaj Eduardo Larrouy).

LOKE ...

PASINTA ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Kiel anoncite, la 16-an de marto okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de la Grupo. Ĝin ĉeestis nur 9 asocianoj (bedaŭrinda malgrandra nombro). Inter aliaj aferoj, oni aprobis la kontostaton de la jaro 2007 kaj la buĝeton por la jaro 2008. Ankaŭ oni decidis startigi novan E-kurson en oktobro, dum la kurso en la Vaska Universitato eble malaperos pro internaj organizaj problemoj ĉe la departamento kiu gastigis ĝin.

FORPASOJ.

Antaŭ ol la komenco de la ĝenerala kunveno, ni ricevis malagrablan novaĵon, nome, la forpason de la veterana esperantistino **Amparo Barón**, unu el la fondintoj de la E-Grupo de Bilbao en ĝia nuna epoko. Ke ŝi pace ripozu, dum restas en nia memoro.



Iom poste, la 24an de junio, forpasis en Bilbao alia veterana esperantisto: **Teo Sánchez**. Li estis ankaŭ unu el la fondintoj de la E-Grupo en ĝia nuna epoko, t.e., ekde la jaro 1953. Dum pluraj jaroj li estis laboristo en Francio kaj jam emerita, ofte ĉeestis la kunvenojn en nia sidejo, eĉ apartenis plurfoje al la estraro de la Grupo. Inter la 12/03/1991 kaj la 08/03/1993 li estis la prezidanto de nia asocio.

NOVA KURSO DE ESPERANTO.

Dum la lastaj jaroj, ne eblis organizi E-kursojn, precipe pro manko de gelernantoj. Sed ĉi-jare ni esperas okazigi, almenaŭ, elementan kurson, kiu altiru novajn membrojn al nia sufiĉe maljuniĝinta asocio.

Por tion efektivigi, ni bezonas ĉies helpon: propagandu, disvastigu kaj eĉ partoprenu la novan kurson (Kial ne?).

Supozeble, ĝi komencos la **3-an de oktobro** kaj disvolviĝos ĉiuvendrede, inter la **19,00 kaj 20,30 h**.

KRISTNASKA LOTERIO.

Malgraŭ ke ankoraŭ restas multe da tempo ĝis Kristnasko, ni devas jam okupiĝi pri disvendado de loterio.

Meze de oktobro ni esperas havi la kvitancojn kaj, ekde tiam, ni kalkulas je via helpo por atingi kiel eble plej vastan dissemadon de tiuj propagandiloj de nia E-Asocio.

NOVA RET-ADRESO DE LA E-GRUPO.

Notu bone la novan ret-adreson de la Grupo de Bilbao:

esperantobi@gmail.com



Kuenko. Hispana Kongreso.
De maldekstre dekstren: Eduardo Larrouy, Iciar Arteche, Jesús M. García, José L. Bringas kaj ilia madrida amiko Toño del Barrio



Roterdamo. Universala Kongreso.Vizito al la Centra Oficejo de UEA. Teodoro Ibáñez, Iciar Arteche, Eduardo Larrouy kaj Jesús M. García.

HEF-Oficejo.

La estraro de HEF deĵoras, persone, lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es, sed atendu ĉar vi ricevos la respondon la sekvontan lundon.

Renovigo de la HEF-estraro.

Post la demisio de preskaŭ ĉiuj la nunaj estraranoj (per letero, Pedro Garrote, Carmen Suárez kaj Lupe Sanz; en forumo, Jorge Pavón; Augusto Casquero, antaŭ monatoj, petis al la estaro esti anstataŭata kiel prezidanto pro personaj kialoj) , dum la Kongreso de Kuenko, oni elektis novan estraron, kiu restas jene:

Prezidanto: Arturo Jiménez Carretero. (HEF-nro. 3270 - ekde 2004). CIUDAD REAL.
Vicprezidanto: Pedro Hernández Úbeda (HEF-nro. 3239 - ekde 2002). MADRID.
Sekretario: Félix Jiménez Lobo (HEF-nro. 3113 - ekde 1997). MADRID.
Libroteniste: Raul Martínez Anguita (HEF-nro. 3211 - ekde 2001). CIUDAD REAL.
Voĉdonantoj:
("Boletín"): Angel Arquillos (HEF-nro. 2660 - ekde 2002). MÁLAGA.
(HEJS): Miguel Hernández (HEF-nro. 3286 - ekde 2006). MADRID.
Juan Trenado Serrano (HEF-nro. 3293 - ekde 2007). MADRID.

(Lupe Sanz-Bueno, HEF-eksVicprezidantino. En la ret-forumo "HEF-anaro")

HEF kongresis en Kuenko.

Kiel anoncite, la ĉi-jara HEF-kongreso okazis en la belega urbo Kuenko. Partoprenis ĝin 4 bilbaoanoj (vidu foton sur la antaŭa paĝo), kiuj veturis tien per aŭtomobilo.


Lingve tre altnivela, la kongreso taŭgis por renkonti malnovajn geamikojn, aŭskulti interesajn prelegojn, nomumi novan estraron de HEF kaj daŭre paroli pri la nuna stato de nia asocio.

Venontjare HEF kongresos en Malago.

Laŭ oni decidis en Kuenko, post propono de Angel Arquillos, la venontan jaron, HEF kongresos en alia bela urbo: Malago.

Se vi interesiĝus pri la partopreno en tiu kongreso, certe estos en nia Grupo homoj pretaj kune veturi.

BILBAOANO REPREZENTAS HEF EN LA KOMITATO DE UEA.



La membro de la E-grupo de Bilbao, Jesús M. García Iturrioz, partoprenas la kunvenon de la Komitato de UEA, kiel A-komitatano por Hispanio, dum la UK en Roterdamo.

LEGITA EN ĴURNALO.

Plenpaĝe eblas legi, en la ĉefa ĵurnalo de Bilbao, la alveno de **Susan Polgar** al ŝakturniro okazinta en nia urbo. Ŝi sidas inter la klarigantoj de tio, kio okazas ene de la granda vitra ujo, konstruita en la centra "Nova Placo", kie ses "ĉefmajstroj" ludas matĉojn. En tiu informo, oni donas kelkajn biografiajn trajtojn de Susan Polgar kaj, interalie, eblas legi:

*"Ŝakistino kiel siaj fratinoj Judith kaj Sophia, ŝi lernis hejme kun **ESPERANTO** kiel gepatra lingvo. Ili faris la ekzamenojn sen ĉeesti lernejon kaj ludis ŝakon kun knaboj ..."*

("El Correo". 05/09/2008. Paĝo 43)

Ne forgesu la novan ret-adreson de nia E-Grupo:

esperantobi@gmail.com

TRA LA MONDO ...

Ekopedio.

Laŭ informis Henri Masson, ekis Ekopedio, laŭ sistemo simila al Vikipedio. Komence ĝi aperas en la lingvoj angla, germana, pola, franca, itala kaj Esperanto:
http://www.ekopedia.org/
http://eo.ekopedia.org/ĉefpaĝo
Henri ankaŭ informis ke la esperanta vikipedio atingas jam 98.221 artikolojn.

(Darío Rodríguez. 07/05/2008)

Dek tri mil ĉinoj ĉe lingva festivalo.

La unua Lingva Festivalo en Ĉinio allogis pli ol 13.500 ĉeestantojn, kaj post la angla Esperanto estis la plej populara el la 70 lingvoj prezentitaj kaj instruitaj ĉe la festivalo. Laŭ la direktoro de la festivalo, Dennis Keefe, kredeble estis atingita nova monda rekordo pri kvanto de Esperanto-kursanoj dum unu aranĝo. Al la sukceso de la aranĝo grave kontribuis la nuntempa vicestro de la Fako pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Nanjing, Cui Jian Hua. Laŭ ŝia propono la universitato nun volas dungi instruistojn, kiuj krom sia gepatra lingvo povas aldone instrui Esperanton.
Por legi la tutan tekston, http://www.liberafolio.org/2008/chinalingvafestivalo/

(Germain Pirlot. 15/05/2008)

TV - Esperanto - en Białystok.

La 2-an de majo en 2008 ĉe la retejo http://www.itvc.pl startis nova projekto: "TV - Esperanto" aŭ "Televido-Esperanto" ! Nia celo estas transdoni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la iniciatinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ el aliaj partoj de la mondo, kie delonge la ideo de Esperanto estas konata. Ni elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj ktp. Ni prezentos la plej interesajn libroeldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzikajn ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn.

Ni esperas, ke la projekto iĝos la diskuto-forumo por esperantistoj el la tuta mondo. Kadre de la elsendoj de "Televido - Esperanto" ni lanĉis konkurson. La konkursajn demandojn vi povos aŭdi en kado de la elsendata programo. Respondojn bonvolu sendi al la redakcia adreso: esperanto@itvc.pl. Ni atendas ankaŭ vian personan komenton, kiun vi povas lasi en la retpaĝo de "Televido-Esperanto" sub la monitora ekrano.

Ni planas elsendi novan filmo-kompilaĵon en ĉiu 2-a semajno. Bonvenon ĉe http://www.itvc.pl por rigardi la nunan programon!

Bjalistoka Esperanto-Societo, PL-15-282 Białystok, ul. Piękna 3, skr. pocz. 67, Pollando.
Retadreso: redakcja@itvc.pl

(Germain Pirlot. 21/05/2008)

Kandidatoj al Nobel Premio.

Literaturo: Esperanto PEN-Centro prezentis al Marjorie Boulton al la Literatura.
Paco: la lingvo Esperanto estis prezentita por du svisaj parlamentanoj.

("Nia Voĉo. Junio 2008. Organo de Madrida E-Liceo. 27/05/2008)

Ĉu japanaj sekurservoj studas Esperanton?

La konata germana periodaĵo Spiegel en sia retejo supozas, ke la sekurservoj de Japanio eknervoziĝas, ĉar kontraŭuloj de la planata G8-pintkunveno uzas Esperanton, lingvo kiun la sekurservoj ne komprenas. En la ampleksa artikolo Spiegel skribas: "Nun ankaŭ la sekurservoj de Japanio subite ekinteresiĝas pri Esperanto. Ili timas la demonstracion de batalema Esperanto-minoritato en la norda insulo de Hokajdo, kie la sekva G8-pintkunveno okazos de la 7-a ĝis la 9-a de julio."
Kompleta informo en: http://www.liberafolio.org/2008/sekurservoj/
Vidu ankaŭ: La Solidareco: http://solidareco.cafe24.com/

(Darío Rodríguez. 03/06/2008)

La Pola Parlamento omaĝas la 100-jariĝon de UEA.

Hodiaŭ matene, la pola sejmo (parlamento), unuanime, per 397 voĉoj proklamis rezolucion, kiu omaĝas la 100-jariĝon de UEA.

(Barbara Pietrzak. 12/06/2008)

100.000 artikoloj en la Esperanto-vikipedio.

Proksimume la 16-an de junio la Esperanto-vikipedio havos 100.000 artikolojn. La internacia lingvo Esperanto per tio antaŭvideble estos la 20-a lingvo, kiu atingos tiun grandecon.

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 13/06/2008)

Paulo Coelho citas Esperanton.

Paulo Coelho, en intervjuo aperinta en la ĵurnalo "Público": "La lengua es algo vivo, se transforma e Internet es lo que está permitiendo hacer realidad el famoso sueño del esperanto".

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 02/08/2008)

(Noto: Tamen, ne estas la unua fojo, ke Paulo Coelho citas Esperanton, ĉar li jam plurfoje faris tion. Ekzemple, en sia libro "la alkemisto".

La membraro de UEA.

La 31-an de aŭgusto estis 5.540 individuaj membroj. Tio estas 266 malpli ol je sama dato pasintjare (5.806). Laŭ la sperto oni povas atendi, ke almenaŭ 200 membroj ankoraŭ kotizos ĉi-jare.

En tiu kazo la fina nombro estos ĉ. 5.750, do klare malpli ol pasintjare (6.011), kvankam iom pli ol en la malbonaj jaroj 2002 (5.713) kaj 2003 (5.714). Eblas tamen, ke la evoluo estos pli bona, ĉar la Bjalistoka UK iomete influos jam la ĉi-jaran membronombron, kvankam ĝia efiko ĉefe aperos en la statistiko de 2009. Al ĝi sendube aliĝos multaj kongresanoj, kiuj nun ne membras en UEA.

Kiel atendite, la plej granda falo okazis en Japanio, kie nun estas 457 membroj malpli ol pasintjare. En Korea Respubliko estis falo de 50. Kreskoj en la cetera mondo kompensas nur duonon de tiuj perdoj. Estas do facile vidi, ke Jokohamo havis pli fortan kongresan efikon ol Roterdamo, kies kongresanoj pli grandkvante estis regulaj membroj. En Japanio la membraro pli ol duobliĝis pasintjare, sed en Nederlando ĉi-momente estas nur 6 membroj pli ol en 2007. Pli da kongresa efiko estis en Francio (+36) kaj Germanio (+16), sed la plej granda kresko tamen okazis en Rusio (+53).

Antaŭvidita estis la plimultiĝo de junaj membroj, kiun kaŭzis la pli granda IJK. En aŭgusto TEJO havis 443 individuajn membrojn, t.e. 79 pli ol en augusto 2007. Eblas, ke la fina nombro atingos 500 ĉi-jare, se oni iom puŝos.

La gejunuloj, kiuj membriĝis pro IJK, pagis la kotizon de Juna Membro kun Jarlibro. Tiu kategorio (nun 290) kreskis per 85 kompare kun aŭgusto 2007 (ĝi eĉ superas per 61 la finan nombron de 2007). La nombro de nejunaj Membroj kun Jarlibro (1282) estas je 124 malpli granda ol en augusto 2007. Ankoraŭ pli falis Membroj-Abonantoj (2605; -168); ankaŭ la junaj MA (116) montras minuson (-6) kompare kun aŭgusto 2007. Notinda estas la plua malpopulariĝo de la malplej kosta kategorio, Membro kun Gvidlibro (269; -51). Eble MG estas malpli alloga, ĉar granda parto el ĝiaj informoj troveblas en Interreto senpage.

Kelkaj landoj ankoraŭ ne pagis por aligitaj membroj, sed jam nun la nombro (11.405) estas preskaŭ sama kiel fine de 2007 (11.477). Aldoniĝos ankoraŭ ĉ. 400 aligitaj membroj, tiel ke la fina sumo estos ĉ. 300 pli granda ol en 2007. Do, la nombro de aligitaj membroj kreskos verŝajne iom pli ol la nombro de individuaj membroj falos, tiel ke la totala membronombro de UEA povos iom superi tiun de 2007. Aligitaj membroj plimultiĝis dank' al Hungaria E-Asocio, kiu pagis por 1.348 membroj kaj en 2007 nur por 142. Tio kovras la fakton, ke en multaj landoj la nombroj malkreskis.

Tre ĝojiga estas la bona evoluo de Societo Zamenhof (nun 162; antaŭ unu jaro 125) kaj Patronoj de TEJO (65, pasintjare 60). Feliĉe, por plibeligi la aliajn ciferojn restas ankoraŭ kvar plenaj monatoj.

(Osmo Buller. Ĝenerala Sekretario de UEA. 01/09/2008)